

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO ESPERANTO SEMAS SIAJN BONAJOJN
PLI FACILIGAS LA KOMERCAJN INTERRILATOJN KONIGAS
LA INDAJN ELTROVOJN KUNHELPOS POR ANSTATAVI
DE FRUKTOBONA PAGO LA SANGAJN BATALADOJN
KIUJ DISSTRAS HOMARON



Alegorio speciale verkita de S^o Pillet, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Dediĉo : Al Doktoro Zamenhof. — Alvoko : Al la Gelegantoj	0
Nuntempaĵoj : Gravaj Horoj, de AUGUSTO MONTROSIER ; Ĉieaj eĥoj	1 ^a
Pri Esperanto : El la alĝeria ekspozicio, de S ^{ino} DANNE, (Francujo). La Bano de Sinjoro la Pastro, <i>deklamaĵo por la Boulogna kongreso</i> , de S ^o PAUL BOULET, (Franc.)	3 ^a
Diversaĵoj : Alĝeriaj skizoj, (Alĝerio).	6 ^a
Artista aŭ literatura vivado : Ŝilero (Schiller), de S ^o CRISTALLER, el Stuttgart, (Virtenbergo). Cervantes, de S ^o R. CODORNIU, el Murcia, (Hispanujo)	7 ^a
Teatra fako : La antikva teatro en Beziere, de F ^{ino} FLOURENS, (Francujo).	8 ^a
Komerco kaj industrio : Berlina vidindaĵo, de J. BOREL, el Berlin, (Germanujo)	10 ^a
Militistaro kaj Maristaro : En S ^t Cyr (Ĉirkaŭ la vizito de l' reĝo Alfonso XIII ^a), (Francujo)	11 ^a
Virina kaj gejunula paĝo : Bohemaj infano kaj lernejo, de ALOIS STEFAN, (Bohemujo)	13 ^a
Felietono : Kanadaj paĝoj : konsento angla-franca, de S ^o BEAUCHEMIN, el Montreal, (Kandlando)	15 ^a
Miksa paĝo : Por la propagando, amuzaj, ludoj (Rebuso...)	16 ^a

REPRESO DE ARTIKOLOJ AŬ ILUSTRAĴOJ ESTAS MALPERMESATA.

Al Doktoro Zamenhof,

Ni oferas tiun riskplenan entreprenon, kiel "Fidfaro" en la estonto de lia admirinda verko, kaj respektatesto por la nobleco de lia karaktero.

LA ADMINISTRANTARO.

Al la Gelegantoj.

Generale, oni komencas, en tia cirkonstanco, favore parolante pri la naskiĝanta verko, petante helpon de l' publiko. Pli malfrue, se la sukceso venas, oni povas danki tiujn, kiuj respondis la alvokon.

Je privilegio, pri kiu mi tre ĝojas, mi povas tuj, en nia unua numero, danki multajn amikojn, konatajn aŭ ne, pro la favoro kaj la sindono, laŭ kiuj ili venis al ni, ĉu ni direkte petis ilian helpon, ĉu komunaj amikoj sciigis ilin pri la verko projektita.

Kaj, fakto veré malofta, kaj pri kiu tiom pli fieri mi estas kaj feliĉa, multaj ne konantaj la revuon, kompreneble, sed eĉ la planon elpensitan, proponis al ni sian abonon, aŭ sian kunla-

boradon aŭ sian helpon « nur tial, ke mi prenis sur min la direkton de la afero. »

Oni permesu al mi malkaŝe diri al ili mian kortuŝecon pro tiu estim = kaj konfidpruvo, tiel laŭde donita.

Por la estonto de la afero, kiun mi ligas kun Esperanto, mi tre ĝojas ankaŭ pro tiuj tiel ŝatindaj kuragiĝoj: ju pli ni havos ĉiuspecajn helpojn, aparte riĉan kaj varian kunlaborantaron, ju pli la Revuo povos plenumi sian celon, kiu, sole, estas doni novan forton al nia kara afero, kiel poste dirite.

A. MONTROSIER.

La « Kialo » de « Tra la Mondo ».

La neceso de internacia lingvo devenas de la multiĝo kaj rapidiĝo de l' interrilatiloj, kiuj ebligis por la homa inteligento agadi en la tuta Universo, se ĝi ne estus haltigata de l' **Lingva barilo**.

Estas do *nature*, ke Revuo, kiu precize celas partopreni en movadon trafontan disfaligon de tiu malhelpo, alfarigis la cirkonstancojn, kiuj naskis tiun movadon.

Nu, la povo de l' modernaj informiloj, plene aliigis Revuojn naciajn kaj « Magasenojn » (Revuoj enhavantaj legotaĵojn pri ĉiuj temoj). La antikvaj kolektaj el rakontoj kaj historioj ne plu estas, anstataŭitaj de Revuoj plej plenvivaj, sciigantaj la gelegantaron pri tio, kio okazas en ĉiuj lokoj de ĝia lando kaj eĉ de l' tutmondo. Baldaŭ tio ne plu sufiĉe kontentigis ĝin kaj ĝi volis vidi tion, kion oni al ĝi priskribis kaj tiel estis kreata la fotografa « Reportado » (Rapidinformado).

Pri tiu punkto, la *esperantista gazetaro malfruis* la naciajn gazetarojn: ĉe ĝi mankis Revuo ilustrata.

Tiun mankon « TRA LA MONDO » tuj ĉesigos.

Oni vidis en la *Enhavo* ĝian « ĝeneralan planon ». Ĝi montras, ke la Revuo estos ja vivplena, nuneca, *penanta interesi ĉiujn kategoriojn da gelegantoj*, ne esceptante virinojn, gejunulojn kaj infanojn, pri kiuj, generale, oni malmulte sin priokupas en niaj revuoj.

Multaj ilustraĵoj akompanos kaj pli interesigos la tekstojn, kiuj, dank' al la taŭgeco de Esperanto por internacia informado, povos esti pli variaj ol en kiu ajn nacia revuo.

Oftaj konkursoj kun premioj estos malfermataj por legantoj de « Tra la Mondo », kiu estos vera ligilo inter Esperantistoj, la *amiko senpacience atendata* ĉiumonate

NIA VENONTA NUMERO

enhavos, inter aliaj, artikolojn de Profesoroj Otto Simon, el Ung Hradiŝ (Bohemujo) : Pentekosta rajdado, kaj Borde el Beaune (Francujo) : Pri la Eskimoj ; de la tiel konata Inĝeniero Kazi Girej (Rusujo) ; de S^o Adinarayana Chettiar, la *Inda* propandisto, k. t. p. ; fine artikolojn kaj multajn fotografaĵojn pri la **Boulogna Kongreso**.

Vidu la 3^{an} kovrilan paĝon.

NUNTEMPAĴOJ

Unua No

Julio 1905.



Kl. Donney, fotog. Londono.

LIAJ MOŝTAJ GEREĜAJ EDOUARD VII KAJ ALEXANDRA.

Antaŭ ne longe la anglaj Gereĝestroj vizitis Francujon kaj Algerion, kaj bonvolis doni simpatian ateston al la algeria esperantista grupo.

Gravaj horoj DE AUGUSTO MONTROSIER.

Ni donos tie ĉi ĝeneralajn kronikojn, kaj ni estos dankaj al tiuj el niaj legantoj, kiuj bonvolos sendi al ni, post traduko, materialon ĉerpitan el naciaj revuoj kaj gazetoj. (1)

Neniam la proverbo « Se Pacon vi volas, preparu Militon » estis pli bone ĝustigata, ol dum tiuj lastaj jaroj.

Nacio, kies regnestro, movigita de plej bonaj intencoj, estis l'instiganto de Parbitracia juĝistaro en La Haye, estas enigita en la plej kolosan bataladon, kiu ĝis nun kontraŭstarigis du popolojn; kaj, kredeble, tro konfidinte al tiu paco, kiun ĝi ŝajnis serĉadi, ne preparante ĝian sangverŝigan kontraŭon « Militon », ĝi suferas sur tero kiel sur maro, malgraŭ la mirinda heroeco de l' batalantaro, samajn malfeliĉegojn ol tiuj, kiuj pagigis al Francujo, dum plorinde memorinda militiro, ĝian troan konfidon al tortoj nesufiĉe pretigitaj.

Hieraŭ, la politika horizonto eŭropana ŝajnis sennuba: interkonsentoj skizigis, kiuj verŝajne certigus tiun Pacon de multaj deziratan. Kaj subite, Germanujo opinias sin flanklasita en tiuj akordoj: kaj la nuboj amasiĝas je la ĉielo, kiun la diplomatio fanfaronis purigi!

Ve! spite plej bonaj intencoj kaj plej laŭdindaj alpenadoj, la horo de l'universala frateco ne ankoraŭ

sonis, konsentante ke Tempo iam ĝin markos per sia sabloverŝilo.

Do, se ni ne devas forgesi la grandanimajn ideojn, kiuj okazigis esplorojn de l' Doktoro Zamenhof, kaj kiuj nin dotis je la rimarkinda interrilatilo de ili naskita, ŝajnas ke, antaŭ ĉio, ni devas vidi en Esperanto la « praktikan » rimedon, kiu ĝi estas, kaj ke ni devas lerni ĝian uzadon al tiuj, kiuj ĝin ankoraŭ nescias, samtempe kiam ni mem plilertigos pri tiu uzado.

Kaj ĉar komercistoj, scienculoj, turistoj, tiaj aŭ aliaj specialistoj, pli kaj pli multaj, uzos Esperanton, per tio mem kaj rebato, iĝos pli intimaj rilatoj inter diversnaciecaj homoj, ĝin uzintaj kiel perilo: se ili estus interrilatintaj per ia nacia lingvo, ili estus simple kuninteresataj en tia aŭ alia afero; Esperanto aldonas simpatian, konsekvenca natura de ĝia uzado.

Ni povas fari pli bone, cetere, liverante la ilon mankantan al tiuj, kiuj prenis sur sin la noblan taskon, specialan kaj ne rekompencantan, labori por proksimigo de l' nacioj.

Antaŭ kelkaj tagoj apenaŭ, interŝanĝis vizitojn la

(1) Elementoj por ĝenerala nuneca kroniko, aŭ eĥoj el diversaj landoj devos alveni antaŭ la 25^a de ĉiu monato. (Tiom kiom eble, sciigi antaŭe, kaj kiel eble plej frue, tiujn sendojn).

Regnestroj franca, angla, hispana, kun sincera deziro por akordo, sentata de l' popoloj siaj.

Delegitoj de l' ĉefaj aroj politikaj, sciencaj, komercaj, k. t. p., el multaj landoj, intervizitas pli kaj pli, similasente.

Fine la internaciaj kongresoj taŭgegus por krei ŝategindajn ligilojn inter individuoj.

Sed tre ofte, en tiuj variaj okazoj, la elmontrado de l' sentoj estas malhelpata de l' lingva diverseco. Ni sciu enpenetriĝi Esperanton en tiun specialan mezon, kiu enhavas homojn potencajn el diversaj landoj; kaj la servoj, kiujn ili povos ricevi de nia lingvo, instigos ilin nin subteni.

Sed ŝajnas, ke tie devas limiĝi niaj esperoj aŭ niaj provoj, mi parolas por la plimulto, favore por ĝia efektiviĝo.

Nacioj, kiel familioj, kiel homoj, havas siajn interesojn. La akordo vivadas tiam, kiam tiuj ĉi ne estas kontraŭaj. Ĉu priinteresa konflikto okazas? Tiam restas nur « homoj » kaj ne fratoj. Kaj la koro de Doktoro Zamenhof, plenkreska homo, kredeble sangadas, kaj sangados, same kiel sangadis lia infana koro.

Tro da konfido en kvieta estonto, favora por senbara disvolviĝo ekonomia kaj sociala de l' nacioj, ekdormigante la plej sentemajn en trompantan sendanĝerecon, estus kapabla, je l' eldormiĝo, jeti tiujn ĉi, kaj eble la aliajn kune kun, en la plimalbonajn aventurojn.

Ni konservu en nia koro, kiel kara ideo, se ni volas, tiun revon pri inter nacioj unuigo, efektivebla iom post iom, ankoraŭ malproksima. Sed ni ne forgesu, ke la celo senpera por ĉiu homo inda je tiu nomo, estas labori por la grandeco de sia Patrujo.

Tiel malgranda ĝi estas, ĉiu estas fiera pri sia nasklando, kaj tiu sento igas fortaj la naciojn, kiel fiereco pri la nomo faras la grandajn familiojn.

Eble, ne estas senutile tion proklami tiam, kiam, antaŭ ne longe, kelkaj homoj ne timis malkonfesi tiun amon al la Patrujo, predikante la forlason antaŭ la malamiko, je l' preteksto, ke la milito estas malpia!

Je la horo, kie iuj el niaj kontraŭuloj, ne povintaj mortigi nin per la ridindeco, provas nin senhonorigi,

trompiĝante intence pri la senco de l' epiteto « internacia » donita al nia lingvo, kaj nin skurĝas per la nomo « senpatruja », ŝajnas ke ni devas laŭtege krii, ke ili eraras, ke nenion komunan ni havas kun tiuj homoj, inter kiuj iu ne timis proklami, ke volonte li starigus la standardon de sia lando sur sterkon! Abomenaj paroloj, apenaŭ kredeblaj ĉe posteulo de l' titanoj, kiuj ĉerpis el sia amego al la Patrujo, la necesan forton por kontraŭbatali kaj venki la plej timegindajn militajn kunligojn.

Kaj, rimarkindaĵo, ili elektas, por proklami tiajn teoriojn, precize la horon, kiam elmontriĝas tiel videble, aliloke, tiu sento de l' nacieco: lingvaj malpacoj preskaŭ konstantaj en Hungarujo kaj Bohemujo; similaj agitadoj, la lastan jaron, en la landlimoj de Aŭstrujo kaj Italujo.

Cu oni ne parolas pri ebla disiĝo de Hungarujo kaj Aŭstrujo? Kaj jen okazinta la malkuniĝo de l' du « Siamaj » fratinoj: Svedujo kaj Norvegujo.

Kaj tamen, kiel ĝustece rimarkigis reĝo Oskar, ĉiu el ambaŭ popoloj estas kondamnita ludi, apartiĝinta, rolon nur sensignifan en la mondo tiam, kiam la duobla estajo, kiun kune ili formis, povis havi parolon pli atentindan, pli aŭskultatan.

Sed Norvegujo juĝis sin ĝenata, en sia disvolviĝo, esti ĉiam kvazaŭ posttrenata de antaŭnaskita fratino, kies superecon ĝi ne plu volis konsenti, kaj de kiu ĝi opiniis sin oferata.

Kaj la sveda kaj norvega « Unuigita Reĝolando » disiĝis, dum sur ĝiajn ruinojn starigis kaj kraketis je l' vento la standardo de l' Patrujo!

Ni ne forlasu tiun kronikon, ne aludante la komentintajn negocojn pri la konkludo de l' paco inter Rusujo kaj Japanujo.

Ne elmontrante pliamon por iu el ambaŭ kunbatalantoj, kies kuraĝo kaj heroeo estas simile admirindaj, ni ne povas ne fari fervorajn dezirojn por la sukceso de tiuj negocoj, kiuj finigus teruran sangelfluigon kaj ebligis grandan eŭropan landon plenumi evolucion kies neceso estas konsentita de multaj, aparte de ĝia Aŭgusta Regnestro.

A. MONTROSIER.

Ĉieaj eĥoj.

Hispanujo.

La reveno de Alfonso XIII^a.

La akcepto entuziasma, belega, kiun faris Hispanujo al sia Reĝo post lia vojaĝo en Francujon kaj Anglujon, superis la esperojn de kiuj plej deziris, ke ĝi estu fervora. Tiamaniere la popolo celis montri, ke estas granda ĝia dankemo al kiuj bonvole akceptis lin, kaj pruvis ke ĝi, kore, jesigas la amikan nacian unuigon. Car Alfonso XIII^a, kiu en Parizo kaj Londono prezentis la Hispanujon, ĉe sia reveno en Madridon prezentas la ligilojn de amikeco kaj kunfratiĝo de la tri nacioj. Oni festis ankaŭ la nesukceson de la krima atenco, varme protestante kontraŭ agoj kiuj, pro siaj malkuraĝo kaj malboneco, elfluigas la koleron el ĉiu brusto, kaj ekflamis la indignon en ĉiu animo.

Samtempe kortuŝis la popolon io, kio vivigas la esperon; io, kio ŝajnas antaŭsigno ke, per lertece kaj saĝeco supre



ALFONSO XIII^a.

kaj patriotismo sube, la nacio povos sukcesi profitojn nedisputeblajn, kiuj ebligis konfide atendi la estontecon. Diris ĵurnalo: « Ŝajnas, ke por Hispanujo komenciĝas nova epoko ». Tiaj cirkonstancoj ja diras al la Hispanoj: « Alten la korojn, malfermu viajn brustojn al la espero, ĉar de via konduto dependas precipe la feliĉeco de via patrujo, ĉirkaŭita hodiaŭ de la simpatioj de potencaj nacioj. »

R. CODORNIU, Murcia.

Francujo-Gazetaro.

La nacia gazetaro pliriĉiĝis per atentinda ĵurnalo, presita duone france kaj duone esperante, kiu celas propagandon inter la granda publiko. Estas dezireginde, ke ĉiuj propagandistoj en franc-lingvaj regionoj disdonos kaj diskonatigos tiun novan ilon, kiu celas praktike propagandi sub lerta direkto de l' konata profesoro C. Lambert, el la Dijona Universitato.

PRI ESPERANTO

El la Alĝeria ekspozicio.

La Boulogna kongreso, unua elmontregado esperantista vere internacia, laŭ la plej ampleksa senco de l' vorto, signos, ni tion povas esperi, decidan marŝepokon en la antaŭenirado de la afero, por kiu ni bataladas. Elokvence, ĝi atestos la universalecon de l' movado, kiun multaj homoj obstinas kredi enlokiĝinta en la urbo aŭ la regiono, kie ekzercigas la aktiveco de l' propagandistoj, per kiuj ili aŭdis paroli pri Esperanto.

La sama dubema parolo elforflugas la lipojn de multaj skeptikuloj: « Ja, vi atingis rezultatojn tie ĉi, sed ĉu estas same en la tuta lando? » aŭ « Konsentite, ekzistas Esperantistoj en Francujo — aŭ en Germanujo, en Anglujo,.... laŭ la nacieco de l' parolanto — sed kiu diras al ni, ke el ili ekzistas en aliaj landoj? »


La kongreso, kiu, ni ĝin esperu, ne estos nerimarkata de la « granda gazetaro », scios al ili « fermi la bekon. » Sed, eĉ inter la adeptoj kaj la fervoruloj, multaj ne konsciencas pri la efektiva amplekso de l'esperantista movado:

Ni legas en niaj diversaj revuoj, ke grupoj fondiĝas tie kaj tie ĉi; kaj el tio ni ĉerpas malprecizan ideon pri la bona irado de l' propagando. Estas necesege, ke tiu ideo *preciziĝu*; ke ni havu montrajn punktojn, kiuj permesu tutvidi, per unu sola ekvido, la marŝadon de nia agado; ke ni havu, unuvorte, dokumentojn « kiuj parolas por la okuloj ».

Laŭ tiu kompreno nia ĉefredaktoro organizis, tiel rimarkinde, la Alĝeran ekspozicion esperantistan.

Kaj mi konfesas ke, kiam mi vidis la diversajn linidesegnojn, kiuj, tiel elokvence, resumis la iradon ĝeneralan aŭ diverslandan; kiam mi ekzamenis la multajn kartojn faritajn de la ĉefaj grupoj, kaj reprezentantajn ilian agadejon, mi havis tiun senton, ke mi, kiu ja pretendis koni funde la esperantistan movadon, mi pri ĝi havis nur tre malplanan ideon!

La ekzameno de ĉiuj linidesegnoj montris, ke la irado vegetas dum deko da jaroj, de la fondo de l' Nurnberg' a grupo (1888).



La grupoj.

Dekdu jaroj estas necesaj por ke la nombro de l' grupoj dekiĝas. Sed, de 1900, la movado plirapidigas; kaj la kurbo iĝas preskaŭ vertikala, triumfa, vidigante progreson da 200 grupoj nur en kvar jaroj!

La landoj.

En 1901, estas ne pli ol 9 landoj enhavantaj grupojn, inter kiuj Francujo venis nur en 1897, antaŭirita de landoj germana (Bavujo), skandinava (Svedujo), slava (Rusujo). Pasante, ni rimarku tiun fakton, kaj ni ĝin kontraŭcitu al tiuj, kiuj pretendas, ke la solaj popoloj latinaj povas lerni Esperanton!


En 1902 estas tuŝataj 5 novaj landoj, inter kiuj Anglujo, kiu de tiam marŝegas, naskinta pli ol 35 grupojn de la komenca lerta agado de S^o Rhodes (Keighley); en 1903, 10 aliaj, inter kiuj Alĝerio kaj Japanujo, kiu, antaŭ la terura nuna militado, fratiĝis en la paca laboro kun niaj bravegaj amikoj de Vladivostok.

En 1904, fine, ĝis la momento kiam estis interrompata la kurbo, kvar novaj landoj, inter kiuj Malto kaj Meksikujo, tiel agema kaj malavara, malgraŭ sia malgranda anaro.

Gazetaro.

La kurbo de la fondo de l' gazetoj havas similan iradon, kaj tio kompreniĝas. En Germanujo ankaŭ, Nurnberge, naskiĝas la unua revuo « L' Esperanto » en 1889, sekvata, la saman jaron, de « Mondlingvisto » (Bulgarujo). En 1895 eliras la « Lingvo internacia », poste « L' Esperantiste » franca en 1898, kiu serioze partoprenas en la rimarkinda suprenflugado de l' afero esperantista. En 1901 desegniĝas eksterordinara gazetara movado, dank' al kiu la nombro de l' revuoj pasas de 6 ĝis 40 (aprilo 1905); kaj de tiam, ĵus fondiĝis ankoraŭ « Esperanto » hungara kaj franca, « Ruslanda Esperantisto » kaj fine « Tra la mondo ».

Speciale por niaj legantoj ni kopiigis kelkajn el tiuj kurboj, plenigantajn la antaŭajn ciferojn, ĉar ili tre taŭgas por doni novan forton kaj valorajn argumentojn por la propagando.



Utileco de « Tra la mondo » por la propagando.

L'agrableco por legantoj, antaŭdirita, ŝajnus al multaj jam sufiĉa. **Tra la mondo** celas plie. Ĝi volas *ankaŭ utili la propagandon laŭ nova maniero.*

Multaj personoj restadas indiferentaj kontraŭ tekstoj ne komprenataj; kaj, male, interesigis je ilustraĵoj, serĉante kompreni la apudajn tekstojn.

Aliaj eĉ, aparte ne— aŭ kontraŭ esperantista gazetaro, obstinas nei nian ekzistadon kaj la eblecon de tiu de Esperanto. Tio estas grava barilo por niaj progresoj; ĉar tiuj solaj, kiuj ne age propagandas por nia lingvo, povas malkonsenti necesecon de l' gazetara kunlaborado.


La celo trafota estas devigi tiujn malkredemulojn bezoni nin. Ni estas bonege lokiĝintaj por esti sciigataj pli rapide kaj bone ol kiu ajn pri ĉio okazanta sur nia vasta tero. Per siaj rilatoj ĉiu militanta esperantisto havas, en ĉiuj landoj, kelkfoje en ĉiu granda urbo korespondanton pretan por lin sciigi tiam, kiam la naciaj ĵurnaloj estas devigataj havi specialajn senditojn. Ni invitas niajn amikojn kaj legantojn esti, laŭ cirkonstancoj, tiuj specialaj senditoj, kiujn favora

femo transportis subite sur tiun aŭ alian lokon interesan de l' globo, kaj sendi al ni dokumentojn, ilustritajn se eble.

Se tiuj ĉi estas sufiĉe vidindaj kaj legindaj, ili perforte aliros atenton de la gazetaro kaj de l' publiko, malamikaj aŭ indiferentaj, samtempe kiam ili interesos la samideanojn.

Duobla celo trafota de sola penado: rezultato ŝatinda por tiuj ĉi, gravega por la estonto de la lingvo! (1)

SinJORINO DANNE.



ERO DE VLADIVOSTOKA EKSPOZICIO.

Paca societo esperantista.

Mi klarigis ke, laŭ mia opinio, Esperanto devas agadi por la paco precipe kreante interesajn rilatojn inter homoj ĝin uzantaj praktike; kaj ni penados agi por multigi tiajn rilatojn.

Tamen ni sekvas kun intereso senditojn faratajn por starigi direkte simpatiajn sentojn inter popoloj per paca propagando; kaj de ni ĉi kore salutas la verkon de S^o Moel, fondinta de l' « Esperantista paca societo », dezirante por li kaj liaj

kunlaborantaj la sukceson, kiun meritas liaj nobelaj penadoj.

A. M.

La Boulogna kongreso.

Ĉiuj niaj revuoj longe parolis pri la festoj organizataj; ni do preferas presu tien ĉi unu el la diskutaj, afable senditan al ni de S^o Paul Boulet, la ierta eidonisto de l' kongresa gvidlibro.

La Bano de Sinjoro la Pastro.

LAŬ GEORGES MAUREVERT.

Sinjoro la Pastro ĉirkaŭrigardas, maltrankvile... La loko estas dezerta, ĉarma kaj favora. La malgranda golfeto estas ŝirmata kontraŭ la nordaj ventoj de larĝaj ŝtonegoj, pentrinde tranĉitaj kaj ombrigitaj de abioj.

Trans la golfo, ne malproksime, oni ekvidas la blujajn montetojn de « Lanvezel ». Similaj al grandaj papilioj sur la ondoj, la barkoj de « Douarnenez » surnaĝas, puŝataj de la vento.

Blanka velo !... Estas la barko de Sinjoro la Juĝisto kiu fiŝkaptas; la juĝisto vidas tre bone, sed estas certe, ke li ne povus rekoni la pastron « Le Clech » de kie li estas !...

Sinjoro la Pastro estas sola, tute sola... La maro estas blua, blua tiel kiel la ĉielo; tiel kiel la maro, kvieta estas la ĉielo... Nenia bruoj, krom la akra alvoko de la mevoj kaj la dolĉa murmuro de la alfluo kontraŭ la rondaj ŝtonetoj ĉe la marbordo.

Nu !... Sinjoro la Pastro demetas sian pastran veston; li ĝin faldas zorge kaj metas ĝin sur ŝton-

egon, kiu nur post tri horoj povos esti atingata de la maro. Li demetas siajn ŝuojn ornamitajn de argentaj bukoj, sian mallongan pantalonon, siajn ŝtrumpojn... Sinjoro la Pastro, ĉemizvestite, rigardas ĉirkaŭen... Neniu !

Honteme, li metas blankan kalsoneton larĝe striitan je nigraj linioj horizontalaj... Li demetas sian ĉapelon, poste sian ĉemizon, kaj metas ilin sur la pastran veston; sed li konservas siajn sanktajn medalojn.

Dika kaj grasa, kiel atleta, kun sia bona ruĝa vizaĝo, Sinjoro la Pastro antaŭeniras al la maro.

La ondetoj kisas liajn nudajn piedojn. He ! he ! ! estas malvarme !... Frostremo skuas la grason de Sinjoro la Pastro... Nu ! Kuraĝe !... Li antaŭeniras malrapide, malrapide, liaj brakoj krucigitaj sur lia vasta brusto, la ŝultroj skuataj de tremoj... Liaj vangoj ŝveliĝas kaj liaj lipoj elspiras longajn frostsentemajn ekĝemojn... Nu ! Sinjoro la Pastro ! Nu !... Mirinde !... Li estas subakvigita ĝis la brusto en tiu

(1) Dank' al interesaj artikoloj pri diversaj temoj, inter kiuj multaj pri la Rusa-Japana militado, vojaĝoj de geregnestroj anglaj francaj, italaj, germanaj, en diversaj landoj, societaj demandoj, festoj, moroj, k. l. p. la ĉefa redaktoro de **Tra la mondo** sukcesis interesi multajn alĝeriajn gazetojn al Esperanto.

akvo agrabla kaj tiel klara ke oni vidas la fiŝetojn kaj la krabojn, kiuj kuras tra la markreskaĵoj... Unu, du, tri... Sinjoro la Pastro eknaĝas kvazaŭ li estas perdata!

He! he! Sinjoro la Pastro ja tre bone naĝas! Lia graso subtenas lin sur l' akvo kiel korkon kaj li nur devas movi brakojn kaj krurojn por antaŭeniri... Li baldaŭ forestas kvindek metrojn de la bordo.... Sinjoro la Pastro estas lacigita... Haltu! Nun, momento de ripozo!

La brakojn etendante, la korpon senmovigante, trempita ĝis la oreloj, Sinjoro la Pastro rigardas la puran ĉielon kaj li dankas Dion pri tiu simpla feliĉo... Ha! Dio mia!... Kiel bone oni estas!... Kia ĉarma malvarmeto!... Kia perfekta ripozo!... Kia feliĉegeco!... Oni restus tiel dum la tuta vivo kaj la tuta eterneco!... Naĝi en la etero!.. Nuntempe, Sinjoro la Pastro konsideras nur tiel la rekompenco de la feliĉuloj kaj de l' elektituloj.

Ho ve! Oni ne devas trouzi la plej bonajn aferojn. Bano kiu daŭras dek minutojn tute sufiĉas por homo kvindekjara.

Sinjoro la Pastro renaĝas al la marbordo ĝis kiam liaj piedoj tuŝas la sablon. Li eliras bedaŭre el l' akvo kaj returneniras, kien li estas demetinta siajn vestojn.

Nu!... Kie estas liaj vestoj? ... Li bone memoras esti demetinta ilin sur tiun ĉi ŝtonegon!... Li estas certa pri tio! Li ĵurus pri tio!...

Li rigardas maldekstren, dekstren... Nenion!.. Malaperintaj! Forflugintaj!... Sinjoro la Pastro palegiĝas... Ne estas pro malvarmo ke li tremas, estas pro timo!... Sendube, oni estas forŝtelinta ilin de li!

— Kukole!.. Bonan tagon! Sinjoro la Pastro!!

Ektremante, Sinjoro «Le Clech» rigardas tien, de kie venas la moka alvoko... Kaj kiun li vidas, starantan sur la ŝtonoj, kvin aŭ ses metrojn super li, ridantan kiel frenezulineto?... «Yvonne Le Guermeur», juna fraŭlino el sia paroĥo, beleta brunulino kun la vivaj okuloj de sciuro, tiel maltimiga kiel birdo, tiel ruza kiel vulpo.

Ŝi tenas en siaj brakoj la vestojn de la Pastro kaj ŝi ridas, ridegas! Sinjoro la Pastro estas furioza!...

— Vi ne estas hontanta, petolulino?... Rapide, realportu miajn vestojn!... Mi diros tion al via patreto, kaj vi ricevos severan punon!...

«Yvonne» ankoraŭ pli forte ridas.

— Nu! Sentaŭgulineto, malsupreniru rapide aŭ mi iras al vi, mi!..

— Nu, venu tien ĉi, Sinjoro la Pastro!..

Kun decidema vizaĝo, Sinjoro la Pastro antaŭeniras iom!... «Aie»!.. Li estas nudpiede. La friponino estis ŝtelinta eĉ liajn ŝuojn! Kaj la ŝtonetoj kontuzas liajn piedfingrojn... Kiel suprenrampi al ŝi?... Kaj ŝi ridas pri lia malgaja mieno.

— Aŭskultu, Sinjoro la Pastro, mi bonvolas redoni ilin al vi, sed kondiĉe!

— Kondiĉon, al mi, serpenteto!

Sinjoro la Pastro furiozas kaj li levas minacan pugnon al la senhontulino, kiu mokas lin.

— Jes, Sinjoro. Kial vi diris al mia patrino ke mi estas tro juna por edziniĝi kun «Yvon» ĉe la Sankta Miĥaelo?... Mi estas dekokjara, Sinjoro la Pastro, mi havas sufiĉan aĝon por edziniĝi!..

Sinjoro la Pastro sufokiĝas, kaj frosttremoj ektrermigas liajn ŝultrojn kaj liajn brakojn!..

— Vi kuraĝas! Falsa bravulino!... Miajn vestojn, mi volas miajn vestojn.

— Aŭskultu, Sinjoro la Pastro, mi redonos ilin al vi se vi promesas diri al mia patrino min edziniĝi kun «Yvon» ĉe la Sankta Miĥaelo.

— Ŝtelistino! Mi arestigos vin de la ĝendarmoj!

Kaj ŝi ridas, ridegas!

— Nu! estas tio! Iru do serĉi la ĝendarmojn!... Ha! Ha!... Nu!... Sinjoro la Pastro, promesu! Ĉu tio koncernas vin? Mi demandas tion al vi?

La Pastro estas frosttremanta pro malvarmo. Li decidiĝas...

— Estas bone, estas bone!... Mi parolos al via patrino.

— Vi promesas, vere?

— Mi promesas... Nu, donu rapide, ŝentaŭgulino,.. Kaj la demono forportu vin!

Ŝi malsupreniras tri metrojn, kaj haltas:

— Ha! Mi forgesas, Sinjoro la Pastro; vi devas ankaŭ senkulpigi min!

— Senkulpigi vin?...

— Jes, pro la ŝerco, kiun mi faris al vi. Tiel, vi ne povos rakonti ĝin al mia patro!

Sinjoro «Le Clech» piedfrapas... Per sia dekstra mano, li desegnas en la spaco nedifinitan geston...

— Estas bone! Estas bone!! Vi havas ĝin... «Ego te absolvo»! filino de la diablo!... kaj zorgu mian poŝhorloĝon!!!

Liaj dentoj krakas... «Yvonne» malsupreniras zorge, rigardante sian suferulon, demetas la vestojn sur la sablon, dek metrojn antaŭ la Pastro, kaj saltante kiel kapro, ŝi foriras rapide, rapidege....

Denove sola sur la bordo, Sinjoro la Pastro revestiĝas febre, blovante, kun la korpo blua pro malvarmo... Kaj li pensas melankolie je la granda malvirto de l' infanoj de la centjaro.

Sed fine bona rideto aperas sur lia luna vizaĝo, dum li pensas pri la ĝojo de la Episkopa Moŝto, pri la ĝojego de la kunmanĝantaro, kiam, proksiman dimanĉon, dum la jara matenmanĝo ĉe la episkopejo, li rakontos sian malagrablan aventuron.

Esperantigita de

PAUL BOULET.





DIVERSAĴOJ



Alĝeriaj pejzaĝoj.

El Kantara.

Malmulte konata de turistoj, kiuj, ĝenerale, ĝin preterpasas irante Biskra'on, kiom tamen tiu loketo,



Kl. Layer.

EL KANTARA OAZO.

pro ĝia karakterizeco vere alĝeria, ankoraŭ difektita per nenia peceto de nia moderna civilizacio, estas preferinda je sia fama najbarino.

Traveturinte senkreskajan valon, borderitan oriente per montara elstarajo, laŭlongirinte « oued'on » (riveron) preskaŭ sen akvo, kies bordkrutaĵoj, kurioze dividitaj per paralelaj tavoloj kaj perpendikularaj rompigoj, estas ialoke kvazaŭ muroj masonitaj, lerte laboritaj, oni alproksimiĝas la vastan muregon orientan, kiu ŝajnas voli bari la vojon je la fervojo kaj l'ouedo.

Sed jen malfermiĝas profunda kaj mallarĝa traĝejo, en kiun tuj penetras la vagonaro, post vojaĝantoj kontentigis, ĝenerale, memoriĝi sian trapason per ia « kodak »-puŝo.

Tiun intermonton transirinte, oni ĝuas miregon. La okuloj tutvidas la oazon, en kiu zigzagas pentrinde l'ouedo, kun bordoj jen krutaj kaj substarantaj la ruĝan vilaĝon aŭ la vilaĝon nigran (nomoj pravigataj de l' koloroj de brikoj el malbakita tero, uzataj por la doma konstruado); jen disfalintaj ialoke, kuntirante ĝardenojn kaj palmojn en la ouedon.

O! vi, kiu ŝatas naturon, kaj alveturas Biskra'on, haltu en El Kantara: tie vi trovos landon ankoraŭ virgan kaj ne senigitan je ĝia karakterizeco (franca esprimo: senflorigitan), loĝantaron amindan, mirindegajn lumefikojn.

Tie, ĉiuhore tage, sed precipe vespere, kiam, preterpasinte la vilaĝojn, laŭ paŝetoj vojirante, oni turniĝas, kaj kiam antaŭstaras la vasta masivo monta, vestiĝanta per la plej diversaj koloroj, rozaj, flavaj, ruĝiĝantaj en la partoj lumigataj, dum bluo aŭ violkoloro malpala etendiĝas iom post iom, ensorbante la lumbrilojn, samtempe kiam la radia tagastro subiĝas la horizonton.

Antaŭ, la vasta oceano el la oazo, je la palma branĉaro tiel bela mase, verde bluiĝante, dum altaj branĉoj orumiĝas delikate tra disaj foliaĵoj de l' palmbranĉoj graciaj. Meze, la pentrindaj domoj de l' vilaĝoj, kubo traboritaj per kvadrataj truoj nigraj, kien eniras aŭ el kie eliĝas formoj ruĝaj aŭ grizaj, kiuj estas loĝantoj: virinoj instinkte havas la senton kaj la emon al brilaj koloroj, en tiuj sudaj landoj; pri la homoj, ĉiam la grandan « burnus'on » (kapuĉmantelon), grizan el lano aŭ nigran el kamelharegoj, ili portas en la « bled'o » (interna araba lando).

Aŭ veturite, tra l' oazo kaj la tri indigenaj vilaĝoj (ĉar estas ankaŭ la blanka!), aŭ ĉevale aŭ mule en la ouedo, plene tramarŝebla, aŭ, fine, piede, la vizito detala de El Kantara kaj de ĝia ĉirkauajo havas ravan ĉarmon.

Sed precipe piede kaj vespere, je l' reeniro de l' brutaroj, tiu suda anguleto prezentas sian tutan karakterizecon ripozan, plenigitan ankoraŭ per la



Kl. Layer.

LA SAHARA EBENAĴO.

kontrasto de la vasta ebenaĵo, aliranta suden, kiun oni havas antaŭ si dorsigante al la montaro.

BLEDAMANTO.



ARTISTA Aŭ LITERATURA VIVADO

La lastan jaron Francujo kaj Italujo festis du el la plej altaj homaj gloroj: « Victor Hugo » kaj « Petrarque »; tiun ĉi jaron, Germanujo kaj Hispanujo gloris « Schiller » kaj « Cervantes ». Du el niaj fervoraj propagandistoj: S^o Christaller el Stutgart kaj R. Codorniu, el Murcia, bonvolis verki por ni sekvantajn liniojn pri tiuj grandspirituloj, kiuj per la ideoj aŭ la gloro apartenas al la homaro.

Fridriĥ' Ŝiler'.

En la agrablegaj majtagoj ĉijaraj la germanlingvanoj, kie ajn ili loĝas, primemoris Ŝiler-on, sian plej grandan, plej amatan poeton. Estis la centa datreveno de lia morto, kiu ĉie aparte elmontris lian grandecon, lian gravecon, eĉ por la nuntempo. Precipe en Virmenbergo, (1) hejmlando de l' glorulo, kaj en la ĉefurbo, Stutgarto, kie la granda genio ricevis sian pli altan perfekteĝon kaj unuafoje levis siajn spiritflugilojn, la memoro de l' poeto estas festita kun granda entuziasmo.

Kio do estas la plej profunda kaŭzo, ke Ŝiler' estas adorata de sia popolo kiel neniu alia germana poeto? Ne nur la poeto sola sed la homo, la korlevigulo altiradas la korojn. Per sia idealemo, Ŝiler' precipe estas poeto por la junularo; kaj kiu ĝin gajnis kaj ĉiam gajnadas, tiu neforgeseblas; eĉ la maljunularo, satita per vivosperto, sopiras je siaj junecrevoj kaj volonte eniradas Idealujon. La fundamento de la Ŝiler-a poezio kaj filosofio estas nobligo de l' homaro per morala liberigo kaj beleco; lia mema vivado eminente montras *senlacigan sinceran bataladon* je la plej altaj celoj de lia arto. La sorto malmulte da rozoj surjetis lian vojon, sed pro la ideala subigo de ĉiuj eksteraj malhelpaĵoj, liaj verkoj kvazaŭas faktoj, nepasemaj atestoj de vera granda eminenteco.

S^{ino} de Staël, la plej rimarkinda franca verkistino, kiu, kiel Ŝiler', kelktempon vivis en Weimar', skribis pri li: « Li estis la plej bona homo kaj amiko, plej bona edzo kaj patro, nenia granda eco mankis al tiu ĉi viro, kies vivo estis dediĉata al la virto. »

Lia angla biografo diris. « Li gajnis regnojn neniun sangon postulantajn, li donacis al sia patrujo vastbienojn neniel akiritajn per larmoj de vidvinoj kaj orfoj. » Ŝiler' ne estante nur Ŝvaben-ano aŭ germano sentis tutmondane. Tion elmontras ne nur la temoj de kelkaj liaj verkoj sed aparte tezo pri la plej alta celo de la teatro Tiu ĉi estos atingita « tiam fine kiam homoj el ĉiuj zonoj kaj randoj, forjetintaj ĉiujn katenojn de afekto kaj modo, fratigintaj per ĉieaga simpatio, sin kunigos denove en unu gento kaj alproksimiĝos al sia ĉieldeveno. Ĉiu sola ĝuados ĉies raven kaj lia brusto nur unu senton sentos, jenan: homi! »

Antaŭ cent jaroj la glorulo mortis; kelkunulo, hodiaŭ iranta inter ni, pli ol li mortintas! Ŝiler' vivadas! eĉ hodiaŭ lia spirito fruktemigas nian tutan spiritan, idean, politikan vivon. Certe lia spirito ankaŭ hodiaŭ havas multajn kontraŭulojn eĉ inter tiuj, kiuj lin festis kaj kiuj kredis adori lin.

Ni Esperantistoj do, ni adoru lin ne sole per

(1) Virmenbergo estas la pli frua skribmaniero kaj similas je nia parolmaniero pli ol Vurtemberg.

vortoj sed per faktoj! ankaŭ ni laboru, kiel li, por nobligo, por fratarigo de la homaro!

Prof. CHRISTALLER, Stutgart'.

Cervantes kaj la unua eldono de Don' Kihoto.

Tuta Hispanujo festis, dum la lasta majo, la trian jarcentan datrevenon de la senmorta verko Cervantes'a. Ankaŭ la Esperantistoj kunhelpis, ĉar « *La Suno Hispana* » presigis apartan numeron enhavantan dek-sep tradukojn de fragmentoj de « Sprita Junkro Don' Kihoto de Manĉujo. » (2)

Jam la plej lertaj kritikistoj elkonfesas ke la fama aŭtoro, verkante sian Kihoton nur celis, laŭ sia propra diro, ĉesigi la troan ŝaton por la kavaleriaj libroj, kies scenejo estis mondo da fantomoj kaj sensencaĵoj, kaj, kiel kontrasto, montris sian heroon movigantan en kampo de realeco, en la Hispanujo de la XVI^a jarcento, ĉirkaŭitan de multenombraj figuroj, tiel vivaj kaj realaj, ke oni kredas ja, ke ili ekzistis; kaj esence ili ekzistas nun, ĉar la nuna homo estas la tiama homo, kvankam alimaniere vestiganta kaj parolanta pri aferoj nekonataj antaŭ tri centjaroj.

Don Kihoto ekzistas ankoraŭ en la personoj de multaj hispanoj; kaj vere iaj gedukoj, kvankam ne plu ĉasantaj falkone, sed vojirantaj en aŭtomobilo, estas tamen tiel ŝercemaj, kiel siaj prapatroj; kelkaj provincestroj estas kvazaŭ Sanĉoj, kaj ĉiu amanto parolas pri sia Dulcineo. Eĉ la samaj bestoj de tiu libro nun vivadas, kaj oni vidas iafoje Rozinanton, kiu *tantum pellis et ossa fuit*. Cervantes verkis libron eternan, ĉar ĝia personaro estas vera; tial oni trovas ĝin ĉiam kaj ĉie.


Kaj kion ni diros pri la belaj ecoj de la frenezulo Don' Kihoto? Cervantes faris samtempe ridinda kaj kompatinda lian frenezecon, kaj tiel simpatia estas la figuro de la heroo, ke eĉ kiam li estas batigita de malnobeloj kaj piedegtrapita de porkoj, pro lia kornobleco, pro lia kuraĝo, pro lia celemo al ĉio, kio estas bona kaj justa, ni amas kaj respektas lin. Mi ne dubas, ke se Don' Kihoto, jam nefreneza, aŭ pliguste, Alonso Kihano la Bonulo, estus vivanta en la dudeka jarcento, li fariĝus fervora Esperantisto.

R. CODORNIU.

Prezidanto de la HSpE (Murcia).

(2) Tiu interesa broŝureto, rimarkinde verkita de lertaj hispanaj esperantistoj, estas patruja admirindeca monumenteto starigita de niaj amikoj je la gloro de Cervantes. Ni instigu ĉiujn ĝin mendi, sendante valoron da 0,50 fr. al S^o Aŭgusto Jimenez Loira, administranto de la « Suno Hispana », Godella, Valencia, Espana.

A. M.



DEĴANIR' SUR SIA ĈARO.

Deĵanir' malgraŭ la malpermeso de Herkul', sia edzo, alvenas al li kaj aperas sur ĉaro.

L'antikvaj arenoj en Beziers'o. DE FRAŬLINO JOHANINO FLOURENS.

La 27^{ma} de Aŭgusto okazos en la Beziers'aj arenoj la unua prezentado de l' nova teatraĵo « La Herezistoj » poemo de S^{ro} Ferdinando Hérold, kaj muziko de Karlo Levadé.
Nia lerta samideanino F^{ino} Flourens, la konata tradukistino de francaj Akademianoj, verkis speciale por « Tra la Mondo » la jenan artikolon, sekvotan de alia speciale dediĉota al « La Herezistoj ».

Antaŭ kelkaj jaroj kiam okazis en la cirko de la Arenoj en Beziers'o la unua teatra prezentado, neniu kuraĝis antaŭdiri al la malnova urbo la artan estontecon, kiu estis rezervita por ĝi.

Beziers'o, centro de arto, tio ridetigis tre multe da nekredemuloj. Kie oni trovos, ili diris, la literaturistojn, la muzikistojn, la aktorojn, kiuj per siaj diversaj talentoj, estos kapablaj por verki verkojn egalajn al la grandega kadro en kiu oni prezentos ilin al la opinio de l' publiko? Kie oni trovos publikon sufiĉe entuziasman, sufiĉe aman al la Arto kaj la Beleco, kiu komprenos, el la tuto kaj el la detaloj samtempe, la belegajn verkojn, kiujn oni prezentos al ĝi senmezure pligrandigitajn en la majstra ornamo de la Arenoj.

Beziers'o, centro de arto! Beziers'o, malavara disdonanto de altegaj kortusajoj! Beziers'o, konkuranto kun ĉiuj famaj artistaj centroj! Tio estis tiel bela revo, ke ĉiu dubis pri ĝia efektiviĝo. Kaj tamen, evidenta realeco estas nune tiu revo. La teatro de la arenoj en Beziers'o rajte fieriĝas pri siaj ok jaroj de ekzistado. Ĝi havas eŭropan famon, kaj ĉiujare dek-kvar mil ĉeestantoj okupas la gradojn de l' grandega amfiteatro.

Jes, Beziers'o revivigis la antikvajn teatraĵojn kun la tuta ĉarmo natura kaj kortuŝanta, kiun ili postulas.

Kiel belegaj kaj masivaj estas la Beziers'aj arenoj konstruitaj laŭ la antikvaj teatroj romaj!

Ili estas rimarkinde bone lokitaj. Sur monteto kovrita de olivujoj kaj vinberejoj, la cirko malfermas sian grandegan okulon sub blua ĉielo. De la supraj gradoj de l'amfiteatro oni vidas la lazuran linion de la Mediteraneo kaj la grizbluajn pintojn de l' Ce-

venoj. Kiel ajn malproksimen oni rigardas, de l' montoj ĝis la maro, oni admiras senliman tapiŝon el foliaro verda, kun koloroj tiel dolĉaj, tiel delikataj, kaj precipe tiel diversaj!

Ho! Néforigeblaj altiraĵoj de teatro iluminata de ĉielo tute farita el oro kaj lazuro! Efektive, en la Arenoj, l' arkajo de la suda ĉielo brilega anstataŭas la palan lumon elektran, kaj la sala aero venanta de la najbara Mediteraneo anstataŭas la varmigitan atmosferon de l' tegmentokovritaj teatroj.

La tagojn de la prezentadoj en la arenoj, Beziers'o estas vidinda, kurioza. Ĝia loĝantaro viva, vigla, ĝojema, ridema, babilema, tute suda ja, preskaŭ Marseja per sia farmaniero kaj sia gajeco, sekvante diversajn bulvarojn, iras al la arenoj. Tuj kiam la pordo estas malfermitaj, tiu homamaso kriante, gestante, puŝante unu la alian enpenetras la teatron. Post kelkaj minutoj, ĉiuj gradoj estas okupitaj: ne restas plu unu sola loko!


Kaj tiu vibranta popolamaso estas kortuŝata de l' belegeco de l' horizontoj malvolvitaj antaŭ ĝi. Tiuj miregantaj homoj ĝojegas antaŭ la magia vidaĵo de l' ornamo kun kolosa amplekso, kies supro kuniĝas kun la diafana horizonto, kun tiu ĉielo eksterordinara, ĉielo ruĝega kaj samtempe blua kiel pala turkiso. Ho! Alloga, ensorĉa vidaĵo! Ho! Magio fulmoplana kaj tamen tiel dolĉa de tiu ĉielo de Beziers'o, tiu ĉielo kun rozaj flokaĵoj, kun trenajoj de sukceso, kun cindroj el pala oro sur la ŝanĝema silko de apoteoza horizonto, tiu ĉielo, kies lazuro estas tiel pura, ke oni rajte komparis ĝin kun la bela ĉielo de Grekujo.

Kaj tuj la teatraĵo komencita, bruoj, ridoj, inter-

(1) Ni penados doni tie ĉi sciigojn pri teatraj demandoj en la diversaj landoj, ekz. prezentadoj en Bayreuth, Bussang, Oberammergau, k. l. p. Oni bonvolu nin helpi.

paroloj, ĉio ĉesas. Ĉiu silentiĝas, kaj tiu dankema publiko, vere ema al la arto kaj la Beleco, estas pie atenta same kiel en preĝejo. La silentado estas solena, impresa.

estas fidela reigaĵo de antikva civilizacio. La agado havas lokon en Persujo, en la jaro 401^a antaŭ Jesuo-Kristo, en la palaco de la gloraj reĝoj, ĉe la epoko de la batalo de Kunaksa'o, fama per la return-




PARYSATIS. — REVENO DE LA ĈASO.

Darius, filo de l' reĝo Artakserxes, alvenas kun la ĉasistoj kantantaj.

« *Dejanire* », rememorigantino pri l'antikva Grekujo, triumfe malfermis la serion de la prezentadoj. Miregindan, neforgeseblan sukceson havis tiu teatraĵo de l' mortinta L. Gallet kaj C. St Saëns. Ĝi estis ja la fundamenta ŝtono de l' teatro en la arenoj, la bela kaj fiera Dejanire kiu sufokiĝas en ĉambrego de teatro.

marŝado de la « Dek mil », kiu sekvis ĝin kaj estis senmortigita de Xénophon (Ksenofon).

« *Armide* » genia ĉefverko de l' muzikarto en la XVIII^a centjaro, estas la sola teatraĵo ne speciale verkita por la Beziers'a teatro; sed tiu renovigo estis tiel glora, ke l'animo de Gluck nepre ekre-metis pro feliĉo.



ARMIDE.

Sceno el la kvara akto.

« *Frométhée* » de A. F. Hérold, J. Lorrain kaj G. Fauré, kies agado malvolviĝas en la primitivaj tempoj de l' mitologiaj legendoj, daŭrigis la sukceson Ĝia pentrinda ornamo, prezentanta krutan kaj sovaĝan pejzaĝon kun montoj, ŝtonegoj, valetoj, grotoj, profundegaĵoj, torento, elŝiris kriojn de admiro.

« *Farysatis* » de Srino J. Dieulafoy kaj C. St Saëns

En nia sekvonta numero, ni longe parolos pri la « Herezistoj », lira tragedio ludota la venontan monaton de Aŭgusto.

*Originale verkita de
JOHANINO FLOURENS.*

Béziers'o, 23^{an} de Junio 05.

Komerco kaj Industrio. ⁽¹⁾

Berlina vidindaĵo.

DE J. BOREL (Germanujo.)

La ekzisto de grandaj universalaj bazaroj, kiel oni ilin trovas en Parizo kaj Londono, estas rilate tute nova en Berlino. Sinjoro J. Borel, la distinginda redaktoro de « Germana Esperantisto » verkis por « Tra la Mondo » la jenan priskribon pri unu el la plej ĉefaj, fondita de S^r Wertheim. ⁽²⁾

La Wertheim'aj magazenoj, lokataj en centra kvar-talo proksime de la granda stacidomo « Postdamer Bahnhof », pligrandiĝas senĉese per akiro de novaj domoj apudstarantaj, kaj jam kovras vastan spacon. La stilo de la konstruaĵoj estas tia, ke oni povas ilin pligrandigi nedifektante la artan elrigardon de la eksteraĵo. La konstruoj el griza kalkŝtono, ornamitaj per antikvesimilaj skulptaĵoj, prezentas vicon da longaj fenestroj, mallargaj, levigantaj de la unua etaĝo ĝis la tegmento; esceptante la aron da luksaj montraĵoj fenestroj laŭlonge la strato, nenio en la konstruaĵo memorigas pri bazaro; oni kredas vidi ian antikvan palacon.

Ĉiuj eblaj komercaĵoj estas aĉeteblaj en la magazeno: ne nur modaj novaĵoj, vestaĵoj, dommastraj iloj, libroj, ludiloj sed ankaŭ manĝaĵoj, spicoj, vinoj, viandoj, fiŝaĵo, freŝaj fruktoj kaj legomoj, k. t. p.

Oni povas postuli ĉapelon, kukakajon, pentraĵon, freŝajn ovojn, florojn; oni povas preni bileton por koncerto aŭ teatro, igi sin fotografi, manĝi kaj trinki en komfortaj restoraciejoj, aŭdi muzikon en luksaj salonoj, skribi leterojn en praktikaj skribejoj. Sed ne la diverseco de la vendadoj plej altiras la atenton nek ankaŭ la praktikeco de la interna organizo de komunikiloj, transportiloj, hom — kaj pakleviloj ĉiuspecaj; oni precipe vizitas la magazenojn pro la gustoplena kaj tre arta aranĝo de l' tuto, kombinata kaj plenumita de eminentaj artistoj.

Tri vastaj haloj, ĉirkaŭitaj de galerioj je ĉiu etaĝo kaj lumigitaj tage per vitraj plafonoj kaj nokte per

mieloj da elektraj lampoj, mirigegas la vizitanton.

Malgrandan halon distingigas rebrilanta mura spegularo, antaŭ kiu ŝprucas, meze de verdaj kreskaĵoj, fontanoj lumigitaj per koloraj fajroj.

La grandioza salono, entenanta la orientajn tapiŝojn, meritas specialan atenton, kun ĝiaj muroj kaj plafono riĉe ornamitaj per pentraĵoj kaj lignaj skulptaĵoj laŭ orienta stilo. Proksime oni vizitas la ekspozicion de belartoj, pentraĵoj kaj skulptaĵoj, kaj la interesajn ĉambrojn de artaj antikvaĵoj. Sed unu el la plej rimarkindaj vidindaĵoj de la Wertheimaj magazenoj nekontraŭdireble konsistas el la antaŭ nelonge malfermita ekspozicio de meblaro kaj de internaj domaj aranĝoj: oni trairas longan vicon da ĉambroj, ĉiuspecaj salonoj, salonetoj, manĝo-, dormo-, skriboĉambroj, fumejo, infanejo, kuirejo, banejo, verando, k. t. p.: tiom da ejoj meblitaj kaj ornamitaj de artistoj kun perfekta bongusto. Tiuj ĉi artistoj rimarkinde solvis la problemon mebli laŭ tute moderna maniero, konservante gracion simplecon. Precize tiu komfortplena simpleco estas tio, kio ĉarmas en la meblaranĝo de Wertheim.

Preskaŭ ĉiumonate la magazenoj pligrandiĝas per malfermo de novaj lokoj ĉiam interesantaj kaj originalaj: kompreneble ĉiuj ĉi novaĵoj altiras centmilojn da videmuloj, kiuj fariĝas aĉetantoj. Tiel kunigante la utilon kun la agrablo, oni ofte alcelas ŝatindajn rezultatojn, eĉ laŭ negoca vidpunkto.

Originale verkita de
J. BOREL (Berlin).

Pri « Tra la mondo. »

NIA KUNLABORANTARO.

Jam « Tra la mondo » kalkulas en sia kunlaborantaro aŭtorojn el la plej konataj en ĉiuj landoj: alĝeria, angla, belga, bohema, fina, franca, germana, hispana, inda, itala, kanada, morava, norvega, rusa, sveda, svisa, k. t. p.

Ni do povos doni, en sama numero, artikolojn devenantajn de multaj landoj. *Tio liveros al propagandistoj oportunan rimedon por elmontri, la revuo en manoj, la disvastigon de Esperanto, kaj la similecon, preskaŭ tutan, de l'esperantista skribmaniero en ĉiuj landoj.*

Tiun stilon ni nepre respektos, prenante nur la rajton zorgi pri la alkonformiĝo je la Zamenhofaj reguloj.

NIAJ PROJEKTOJ.

Pliampleksiĝi, kiel eble plej rapide, laŭ la akcepto farita al la Revuo. Ĉiuj estas do interesataj je la kreskado de abonantaro: **Por unuaj abonintoj, neniam estos piialtigata la abonkosto.**

KIEL NIN HELPI.

1^o Abonante sin kaj varbante abonojn (Vidu sur la 3^a koverta paĝo la kondiĉojn de l' **granda konkurso pri abonigoj**);

2^o Kunlaborante;

3^o Havigante al ni reklamojn (vidu koverton.)

Tio ankoraŭ ebligas nin pliampleksiĝi: Oni pripensu, ke ĉiu loko **ilustrita kostas dek fojojn plie, ol sama loko nur presita.** Se ni havos flankajn profitojn, ni povos plimultiĝi la kliŝaĵojn.

(1) Plezure ni enpresos tie ĉi teknikajn, ne tro seriozajn artikoletojn pri Komerco kaj Industrio, por instigi serĉadojn pri la teknikaj esprimoj. Ĉiam antaŭsciigi.

(2) Pro akcidento, ni ne povis kopiigi la interesan fotografaĵon, kiu akompanis la priskribon.



En St Cyr. — Ĉirkaŭ reĝa vizito.

« Mi estos aparte feliĉa renkontiĝi en St CYR kun miaaĝaj oficiroj », respondis reĝo Alfonso XIII^a al demandantoj pri tio, kio plej multe interesus lin dum lia vojaĝo en Francujo. Ni do pensis ke, tie ĉi, niaj legantoj trovos plezure iajn detalojn pri tiu vizito, detalojn ne koneblajn de l' publiko, afable kaj speciale kolektitajn por « Tra la Mondo ».

ANTAŬ LA GRANDA TAGO.

De unu monato, la abelareja aktiveco, kiŭ ĝenerale regas en la iama domo de Sinjorino de Maintenon estas duobligata: la blujaj internaj laborjaketoj de l' lernantoj najbariĝas la blankan tolvoston de l' masonisto; termovistaroj de l' unua regimento de l' militaj inĝenieroj estas pliampleksintaj la malgrandan eksteran rajdejon, kie okazos la karuselo de « Saumur » (2).

Bela Sinjoro, kun neriproĉinda jako, aperas je l' horizonto, akompanata de l' generalo. Estas Sinjoro Mollard, oni diras, la protokolestro.

Ĉar ne estas eta afero, la kontentigo de l' Protokolo! Ekzemple: aparta tualetejo estas necesa por la Prezidanto; alia por la Reĝo; aliaj por la sekvantaro... La elekto de l' ornamajoj devas ankaŭ esti reguligata de la terura S^o Mollard!

— Kion oni diras pri nia juna vizitonto?

Li estas « Kadeto » en la animo, revas nur pri glavo, militmarŝadoj, botoj, spronoj, kiel junuloj siaaĝaj. Oni lin pridiras tre demandema, serĉema pri la kialo je ĉio.

— Tie fotografisto, elektita por verki la reĝan albumon, celigas sian aparaton al lernantaj grupoj. La maljuna pastro, lia moŝto Lanusse, estas feliĉa fotografiĝi. Tio rejuniĝas lin... 87 jaroj!

— La tuta malnova oficistaro, eĉ la « kapitano Bul »! (la razisto de la lernejo), donas al la generalo iajn specialajn sciigojn kapablajn por interesi la reĝon.

— Multaj malkontentuloj; kolereto! Nur kelkaj oficiroj ricevos kartojn por la « Granda Tago », la revuo, la festa teatra prezentado en « Opera », pro

multeco de sekvantaroj oficialaj. La plimulto ĉeestos nur la ripetadojn kun sia familio.

Edzino de leŭtenanto sukcesis haviĝi karton per sia kudristino. Kia influo, kudristino! Jen estas por la kartoj!

— Kaj la ordenoj! Kiel rubandeto plezurigas! Iuj ŝajnas kvazaŭ junulinoj forgesitaj en figurdancado.

— La Ministro mem venis por viziti la preparadojn, kaj uzas tiun cirkonstancon por viziti la lernejon. Bonhomemo de l'inteligenta homo, feliĉa manpremi siajn subulojn. Belega aŭtomobilo ĉe la pordo! Lernanto, oftirulo de l' oficialaj baloj rekonis lin: estas Sinjoro Berteaux.

— Kiom da atentigoj; kiom da malpermesoj!

« La generalo rekomendas al oficiroj, kies fenestroj vidigas en la korton Rivoli, ke tiuj ĉi malfermiĝu diskrete je l' alveno de l' Reĝo.

— Nenia fotografilo.

— Malpermeso al lernantoj iri en la malgrandan arbareton.

— Atento pri la pureco de l'

lernoĉambroj, pri la ordigo de l' klinaj labortabloj, k. t. p. ! k. t. p. !

— La nova regularo por infanteriaj manovroj kaŭzas iajn malfacilaĵojn. Farita por la milito, ĉefa celo trafota, ĝi nefacile permesas « Paradi ». De tie pridisputadoj, malbonaj ripetadoj...Kaj en la granda tago, ĉio estas perfekta: estas ĉiam tiel. Kialo de morala influo, de memestimo, de fiereco!

— Saumur alvenas: videmuloj ĉe la fenestroj! Multaj ĉevaloj unuj post la aliaj, selitaj aŭ ne, kondukataj de soldatoj vestitaj per malsimilaj uniformoj: tie ĉi la kasko de l' dragono, tie la blua tuniko (3) de l' husaro; pli malproksime la pentrinda kostumo de l' Spahiso, poste la afrika ĉevalĉasisto. Sinjoro bele vestita per duonpantalono botita, po-



ATENDANTE LA FOTOGRAFISTON.
La respektinda abato Lanusse kaj kelkaj oficiroj de la lernejo St Cyr.

(1) Ni ricevos plezure artikolojn pri apartaĵoj el la militistaroj kaj armeoj diversnaciaj. Ĉiam aŭtaŭsciigi pri la temo elektita.


(2) Fama kavaleria lernejo franca.

(3) Fr. angl. it. (milita ĵaketo).

madumita, galopas elegante. Estas la « nigra kadro », la ĉefa vidindaĵo de l' Karuselo!

LA GRANDA TAGO.

La gazetoj sufiĉe pripa-
rolis ĝin. Ni ne insistu. Ni
diru nur, ke ĉio estis tre
sukcesanta. Neniu forges-
sas, ke laŭ tiu Milita
Parado, la Reĝo juĝos la
Lernejon, kaj tamen, kian
pli ĝustan impreson, kaj
ne malpli favoran, li kun-
portus vidinte la tagan
vivadon: ekzercojn, ĉiu-
specajn laborojn, kaj pre-
cipe belan kaj ĝojan fran-
can humoron, karakteri-
zan kvaliton de l'estonta
franca oficiro.



RIPETADO DE L' KARUSELO.
Kuna salto de l' plektobarilo.

— Notu la jenajn dirojn de partopreninto en la tagmanĝo: « Kiel Li sidigas sur la Protokolo! » Ja, eksciigante ke la belega ruĝflava ĉevalo « Vulturo » estas donacata al li, li ellasas kelkajn « oh! oh! » tre bruajn, cetere tre nekaŝemajn, kaj pre-
mas forte la manojn de l' Prezidanto. Plue li tuj bap-
tas Vulturon « S^t Cyr »! Ĉar-
ma vivegeco de l' juneco.

Li ne iradis la vojaron
fiksitan!

Ĉe la tagmanĝo, li sen-
lacigis siajn krurojn, kaj
havis neĝenatan tenadon,
kvankam tamen reĝan.

Mallonge, infano tim-
dona por la Protokolo.

S^t CYRANA OFICIRO.
El poŝa notkajereto.

Angla eskadro en Alger'o.

Je la Junia finiĝo restadis en la Alger'a haveno angla eskadro, komandata de l' admiralo Lord Charles Beresford, konsistanta el la ses kirassipoj « Bulwark », « Venerable », « Queen », « Prince-of-Wales », « London », « Formidable », kaj el la du kiraskrozŝipoj « Leviathan » kaj « Diana ».

La kirassipoj estas laŭ sama modelo, kaj donas impreson de perfekta homogeneco.

Malpli altaj de l' akvosupraĵo ol la francaj milit-
ŝipoj, ili malpli imponas profile, kio, cetere ne tute
estas difekto, la esenceco por kirassipo ne estante
ŝajni potenca, sed vere esti tia, samtempe kiam
videbleta. Cetere ili havas laŭlarge, kion ili ne
havas laŭalte, ĉar, fine, oni devas enloĝi la provi-
zajegojn da karbo kaj da armila nutraĵo, la person-
aron kaj la paflegojn de tiuj potencaj militmaŝinoj.

Oni povas esperi, cetere, kaj pri tio ĝoji por la
monda paco, ke la du nacioj ne estas tentataj ser-
ĉadi, en interbatalo, la modelon, al kiu oni devas
aljuĝi superecon.

La restado de l'eskadro estas signita, ja, de novaj
elmontroj, indaj kaj koraj, de l' interkonsento, kiu
regas inter la du grandaj maraj nacioj.

Karakterizaj toastoj estas interdiritaj; ni citos la
sekvantan frazaron el unu el tiuj elparolitaj de
l'angla admiralo; ĝi pruvas, ke la fundamento de l'

politiko devas esti la praktika kompreno de l' aferoj.

« La franca kaj angla nacioj estas grandaj indus-
triaj kaj komercaj nacioj. La ŝiparoj kaj armeoj estas
nur garantiaĵoj por la daŭrigado de tiuj pacaj oku-
poj; ĉar la paco estas la plej grava ilo, posedata de
ĉiu lando, por la disvolvigo de ĝia komerca
progreso.

Estas tute nature, ke amikeco ekzistas inter
popoloj, kies komercaj interesoj estas tiel mallarĝe
kunigitaj ».

Ŝajnas interesinde alproksimigi tiun citon je la
unua artikolo de la revuo, antaŭe skribita de nia
ĉefredaktoro.


La oficiroj kaj maristaroj estis ĉie bone akcepta-
taj kaj festataj. La Angloj ne volis esti malpli
afablaj; kaj laŭ plejbona maniero ili akceptis surŝi-
pen la alĝeran loĝantaron.

Pli ol unufoje ili manovrigis (ludigis) siajn elek-
trajn vidigilojn, formante per lumaj garboj kunajn
figurojn senmovajn aŭ moviĝantajn, kurioze impre-
santajn.

La eskadra muzikistaro aŭdiĝis tere, kaj la plej
varmaj aplaŭdoj salutis la « Marseillaise » kaj la
« God save the King », kiuj enestis la programon.

ALĜERANO.





GELERNANTOJ EN LA LERNEJA ĈAMBREGO.

En bohemiaj vilaĝaj lernejoj, ambaŭseksaj infanoj apudeblas en la sama ĉambrego.

Bohema infano kaj bohema lernejo.

DE ALOIS ŠTĚPÁN.

La infanaro estas la estonto de nia afero; ni do opiniis, ke ni ne povus pli bone malfermi tiun rubrikon, ol donante tiun kuriozan priskribon, kiu rilatas infanan vivadon (2).

La bohema infano vartita estas ĝis la sesa jaro de la gepatroj. Dum tiu ĉi tempo, ĝi havas nenian okupadon krom la ludo aŭ la paŝtado de la anseroj. Post finiĝo de la sesa jaro, ĝi alkondukata estas de la patrino en lernejon. Tio ĉi devas okazi nur unufoje en la jaro, la unuan de septembro. La ĉefinstruisto enskribas la infanon en katalogon, kaj, de tiu ĉi tempo, la infano devas ĉiutage lernejon vizitadi ĝis aĝo de 14 jaroj.

En vilaĝaj lernejoj estas la geknaboj kune en la ĉambro; je unu flanko sidas la knaboj, je la dua la knabinoj.

Antaŭ la instruado ludas la gelernantoj ĉe la lerneja korto, aŭ sidas kaj disputadas en la lerneja ĉambro. La naŭan horon komencas la instruado kaj ĝi daŭras ĝis la dekdua.

En unua klaso (unua lerneja jaro) lernas la gelernantoj kalkuli (kunkalkuli, dekalkuli, multigi kaj dividi) ĝis dek; legi kaj skribi ĉiujn malgrandajn kaj grandajn literojn, poste presitajn literojn; disputadi pri diversaj objektoj rilatantaj la domon la korton, la kampojn kaj la arbaron, k. t. p. En la dua lerneja jaro, kalkuli ĝis 100, legi kaj skribi diversajn artikolojn. El la gramatiko, ili lernas kelkajn regulojn. En la tria lerneja jaro oni kalkulas ĝis 1000. Lernantoj lernas en tiu aĝo ankaŭ ian el la objektoj naturaj, el fiziko, el geografio kaj el historio nacia. En pli altaj jaroj, ili lernas kalkuli ĝis miliono aŭ plu; ĉiun kalkul

adon kun la monoj, mezuriloj kaj kun peziloj. Grava estas memorkalkulado kaj ekzemploj el praktika vivo. Pri sciencoj naturaj oni instruas universale; el gramatiko, ĉion sufiĉe detale; el geografio pri tuta mondo, universale; pri naciaj landoj, detale; tiel same el historio. Desegni oni lernas en ĉiuj klasoj, ankaŭ kantadi diversajn kantojn; en la plej altaj klasoj oni lernas koni la notojn. La bohema infano tre amas la kanton; kie ĝi povas, tie ĝi kantas. Nacia lernejo devas liveri al la lernantoj ĉion, kion la homo en publika vivado bezonas.

En la tagmezo, de la 12^a ĝis la 1^a horo, iras la lokaj lernantoj hejmen por tagmanĝi. Ilia tagmanĝo konsistas el supo, poste viando kun la saŭco kaj terpomoj aŭ buloj, aŭ kiu ajn apudmanĝo. En la fasto tago oni tagmanĝas supon kaj bakitan farunmanĝon, aŭ kaĉon el rizo, ovojn aŭ kion ajn sen viando. En la dimanĉo oni tagmanĝas supon, bovviandon kun saŭco kaj ankoraŭ ian viandbakajon diverse preparitan. Ŝatata manĝo ankaŭ estas buloj kun braziko. La malriĉaj ne alkonformigas tiun ĉi vicon, sed ili manĝas, kion ajn ili havas. Lernantoj, kiuj venadas el ĉirkaŭaj vilaĝoj en lernejon, havas nur en tagmezopanon, kiun kun si en lernejon ili alportadas.

En multaj komunumoj fondas bonfarantaj homoj por malriĉaj lernantoj supajn klubojn. Tiuj ĉi kluboj subtenataj estas de lokaj riĉuloj aŭ de landaj oficoj. Oni organizas ankaŭ kolektadojn aŭ teatrajn ludojn aŭ aliajn amuz-



TAGMEZA LUDO.

adojn por la profito de tiuj ĉi kluboj. Kluboj kuiras kaj disdonadas en vintraj monatoj al malriĉaj lernantoj, en la tagmezo, supon, por ke ili almenaŭ ion varman havu en la stomako.

La tagmanĝo estas ĉefa manĝo. La matenmanĝo kaj vespermanĝo estas malpli gravaj. La matenmanĝo estas ordinare kafo kun lakto, nomita blanka kafo, al kiu oni almordas panon aŭ alian farunbakajon. Vespere oni manĝas ion ajn: panon kun butero aŭ viandfumajon, farunbakajon, ovojn, terpomojn, ŝatatan manĝon de malriĉaj, ankaŭ supon; la riĉaj manĝas viandon diverse preparitan k. t. p.

Post tagmezo komencas la instruado la unuan horon, kaj ĝi finiĝas la trian aŭ kvaran, laŭ la aĝo de la lernantoj.

Post instruado iras la ĝelernantoj hejmen. Hejme ili helpas en la laborado la gepatrojn. Unuj paŝtas la bruton, aliaj la anserojn, aliaj faras bezonajn laboradojn en la jomo aŭ sur la kampo, dum kelkaj amuziĝas per la ludo ĝis vespero. Hejmajn lecionojn oni ne multe rekomendas.

Ĉe la amuzado la infano estas gaja kaj volonte ĝi kantas. En la somero, ludas la infanoj je la ĉevaloj; kun la pilko; je la blinda maljunulino laŭ sekvanta maniero: Ĉiuj ludantoj staras runde; en la rondo estas kelkaj ludantoj; unu el ili havas, per poŝtuketo, la okulojn kaŝitajn kaj kaptas aliajn.

Alia ludo estas je la malbona najbaro. Ludantoj staras runde; la manojn ili havas poste, kaj la korpon fleksitan antaŭen. Unu ludanto ĉirkaŭiras, en la mano havante batilon el poŝtuketo, kaj metas ĝin en la manon de iu ludanto. Tiu ekprenas ĝin kaj batas per ĝi sian najbaron, kiu kuras ĉirkaŭ al sia loko. Ludo rekomencas denove.

Kelkaj ludas je la maizeroj, aŭ je la butonoj. Kaj, tiel, diverse amuziĝas.

Tre volonte ankaŭ ili banas en la riveron aŭ en la

lageton. En vintro, tre volonte, ili interjetas neĝon kaj veturas sur la glitveturileto, aŭ glitas sur la glacio.

En la somero iradas la infanoj nudpiede.

Libera tago en la semajno estas la ĵaŭdo. En tiu tago restas la lernantoj hejme. La ĉefaj libertempoj komencas la 15^{an} de julio kaj finiĝas la 31^{an} de aŭgusto. En tiu tempo, helpas la lernantoj al la gepatroj en la laboroj sur la kampoj: grenon rikoltadi, k. t. p.

Lernejon konstrui kaj je ĝi zorgi, estas la devo de la lando kaj komunumo. La ŝtato havas tamen la rajton, per siaj oficistoj distriktaj kaj landaj, observi la instruadon.


La infanoj, de ĉiuj gepatroj sen diferenco, devas ĉiutage ĉu en somero, ĉu en vintro, lernejon vizitadi. Nur la malsanon, malbonajn vojojn, multe da neĝo, grandegan pluvon, grandegan froston aŭ alian krudan veteron povas la lernanto pretendi, kiel senkulpigo, pro ne iro en lernejon. Malsufiĉa vesto ne estas senkulpigo.

La gepatroj, kiuj malorde la infanojn en lernejon venigas, estas unuafoje admonataj, poste punataj aŭ per mono, aŭ per aresto. Ses duontagoj en unu monato sufiĉas, por ke la patro punata estu.

Lernanto ne devas, en la lernejo, pro kiu ajn peko, korpe ekpunata esti. La instruisto devas, dum la instruado, precipe je la sentoj efiki.

La punoj de la lernantoj estas: Starado en la benko, aŭ antaŭ la benkoj, restado en la lernejo post la instruado, priskribado de ia leciono, kaj aliaj.

Mi esperas, ke estimataj legantoj faros al si, el tio ĉi, almenaŭ ian pentraĵeton pri bohema, vilaĝa lernejo.



GRUPO DA ĜELERNANTOJ.

Mullaj infanoj marŝas nudpiede, kiel arabetoj.



KORPEKZERCOJ.

Salto super ŝnuro.

*Speciale verkita por
« TRA LA MONDO » de*

BOHEMA INSTRUISTO.

(1) Ni penados trakti tie ĉi temojn ŝatatajn de virinoj, ĝejnuloj kaj infanoj. Baldaŭ ni komencos paroli pri virinlaboraĵetoj, ni donos ankaŭ surprizojn por infanoj.

(2) Tiel agante, ni esperas ankaŭ altiri ĝeinstruistojn, montrante al ili la utilon de Esperanto por sciiĝi pri la instruajtoj en diversaj landoj. Cetere, al la sama celo ni intencas organizi grandan konkurson dediĉotan al ĝeinstruistoj.

En Kanado — Konsento angla-franca.

DE A. P. BEAUCHEMIN, EL MONTRÉAL

Lasta-momente ni ricevis la jenan tiel interesan artikolon de unu el la plej kleraj kaj konataj kanadaj Esperantistoj. S^o Beauchemin. Ĝi estos sekvata de aliaj pri tiu atentinda temo: angla-francaj rilatoj en Kanado. Oni rimarkos, kiel estas ŝatata la liberama regnado de Angloj en tiu granda lando.

Trankviliĝu, amikoj de la neŭtraleco, mi ne deziras eniri la eŭropajn politikajn aferojn: mi nur intencas montri al la mondo esperantista, kiel la kanadanoj de longe jam solvis tiun problemon de l'interkonsento, starantan inter du nacioj centjare malamikaj, t. e. la francoj kaj angloj.

Kiam, en 1763, per la traktajo Pariza, la reĝo de Francujo, « Louis XV », cedis al Anglujo la tutan Kanadon, nur restis en Kanado sepdek-kvin-mil francoj malriĉaj kaj disjetitaj en la lando; la aliaj, la plej belaj floroj de la kolonio, reiris Francujon sur la anglaj velŝipoj, kaj tiam Sinjorino Pompadour ĝoje ekkriis: « Fine, la reĝo povos dormi trankvile ».

Jes, sed se la reĝo povis trankvile dormi, kio do fariĝis la forlasitaj francoj en tia sovaĝa lando?

Jen kion mi franckanadano tuj rakontos al vi en kelkaj linioj.

Dum centjaro, sen ia komunika rimedo kun Francujo, ili tenadis en mano, jen la tenilon de paŝilo kontraŭ la atakoj de l' sovaĝaj enlanduloj, jen la tenilon de plugilo kontraŭ la suferoj de malsato. Plie, ili kreskiĝis, plimultiĝis kaj fariĝis tri milionoj da francoj, izolataj kompreneble, sed ĉiam konservintaj siajn francajn kutimojn, morojn, religion kaj lingvon tiajn, kiaj ili estis dum la regado de Louis XV. Tiel glaciĝis kaj konserviĝis, ĝis nia epoko, la malnovaj mamutoj izolitaj en la norda poluso!

Sed eble vi demandos: kial la angloj ne altrudis al vi siajn kutimojn, religion kaj lingvon? Ha! ĉe ili la deziro ne mankis pri tio, sed du kaŭzoj ilin malhelpis.

1. — Dufoje Kanado estis minacata de la amerikana militistaro, en 1775 kaj en 1812. La franckanadanoj, ĵurinte post la traktajo Pariza ke ili estos fidelaj al Anglujo, dufoje batalis la enpenetrantan armeon kaj konservis Kanadon por Anglujo.

Tiu ĉi, devigite de la cirkonstancoj kaj de la timo ke ĝi perdos eble Kanadon, pliagrabiĝis kaj donis al ni la rajton konservi niajn lingvon, religion kaj francan leĝaron. Poste ĝi permesis al ni la memregadon (self-government) kaj tiam, de kolonianoj, ni fariĝis preskaŭ aparta nacio, kun kiu aliaj nacioj, eĉ Anglujo, devas kalkuli en siaj komercaj traktajoj.

2. — Post 1763, Anglujo sendis kompreneble multajn anglajn elmigrantojn al Kanado, kredante eble, ke per ili ĝi fine dronigos, en angla rondegio, la francajn familiojn de Kanado. Sed, mirinde, la malo fariĝis!

Efektive, el tiuj miloj da anglaj elmigrantoj, kiuj loĝiĝis en la provinco Kebeko, kiu tiam estis la plej loĝata, la plimulto da ili perdis siajn anglajn kutimojn, religion kaj lingvon post unu generacio, kaj fariĝis francaj kanadanoj kiel ni, esceptinte la anglajn nomojn, kiujn ili konservis.

Jen kial, en Kanado, oni renkontas multajn personojn kun anglaj nomoj, kiel Smith, Macdonald, Ball, Craig, Fraser, ktp., kiuj ne povas paroli angle, kaj kies infanoj devas lerni la anglan lingvon en la lernejoj.

Ekzemplo pli bone klarigos tion al vi.

La lastan semajnon, en la Montreala juĝejo, franca juĝisto demandis atestanton tiele:

« Kia estas via nomo? — Duncan Macdonald. — Ĉu vi deziras atesti en angla lingvo? — Mi ne vin komprenas. — Vi ne povas paroli angle? — Ne. — Ho! tamen via nomo estas tre angla? — Jes, sed mia prapatro loĝiĝis en tiu provinco, mia patro, mi rememoras, povis kompreni kaj iom paroli angle, sed liaj infanoj ne ŝancis lerni la anglan lingvon... »

Tiaj ekzemploj oftege prezentigas en nia Montreala juĝejo.

Ĉar estas ĝenerala kredo en Eŭropo, ke ni parolas tie ĉi ian francan ĵargonon, mi devas tuj montri per alia ekzemplo, ke oni simple eraras kaj ke nia nuna franca elparolo tre multe similas tiun de la francoj en Francujo.

Antaŭ du jaroj, estante en Parizo, mi eniris magazenon por ion aĉeti kaj la komizo kredis, laŭ mia elparolo, ke mi loĝas en la nordo de Francujo!

Tie ĉi elstaras grava, demanda punkto. Kiel la franckanadanoj akordigas la respekton al la angla regno, kun la memoro pri la malnova franca potenco en Kanado?

La dupatrinaj infanoj de Kanado, kune kun iliaj anglaj duonfratoj, maturiĝantaj komprenis, ke iliaj ekonomiaj utiloj estas tute malsamaj je tiuj de iliaj du patrinoj. Tial, unuigante por komuna utilo, la kanadaj angloj kaj francoj kreis registaron, en kiu iliaj deputatoj diskutadas la enlandajn kaj eksterlandajn aferojn.

Ofte la diskutado fariĝas akrega, sed fine, saĝo rememorigante ke « in medio stat virtus », kompromiso finas la diskutadon.

Tiele, ni kune antaŭen iras, mano en mano, kubuto ĉe kubuto, al nia komuna sorto. Ni sentas ke ni fariĝos potenca dulingva nacio, ĉar nia vastega lando, anstataŭ la ses milionoj da loĝantoj, kiujn ĝi nun enhavas, post mallonge nutros kaj enhavos cent milionojn da ili.

Ĉu oni ne diras nuntempe, ke Kanado estos la grenarejo de Eŭropo? Kial do ni, franckanadanoj, devus plue plori la perdon de nia malnova Francujo, kiam ni jam retrovis tiel belan kaj vivplenan Nov-Francujon, dank' al la liberiga protektado de Anglujo?

Nur tion komprenas tiuj el la francoj, kiuj malgrandnombre, de tempo al tempo, tien ĉi venas por loĝiĝi. Ili sin sentas tiel liberaj kaj senĝenaj en nia lando, ke malofte ili reiras Francujon. La samo fariĝas pri la novevenintaj angloj.

Ke niaj eŭropaj kuzoj, anglaj kaj francaj, pli ofte sin intervizitu, ke ili pli konatiĝu unu de la alia kaj ili baldaŭ spertos, ke la akraj anguloj, elstarantaj el ambaŭ flankoj, estas tre rondigeblaj kaj malaperigeblaj de la simpla frotado!

Tiele, ni kanadanoj, francaj kaj anglaj, jam de longe solvis la gravan demandon pri la « konsento angla-franca ».

Montréal, 12^{an} de junio 1905.

A. P. BEAUCHEMIN.

POR LA PROPAGANDO.

Je tiu ĉi loko, ni presos, ĉiunumere, tekston preparitan por la komencantoj, aŭ eĉ por la tute nesciantoj Esperanton, t. e. tekston, kies vortaj elementoj estos apartigitaj de apostrofoj.

Donante tiun tekston kun vortaro al esperantigotoj, oni povos esperi ke tiuj ĉi, trovante plezuron je tiu traduko, serĉos poste traduki tekstojn nepreparitajn, kiu akompanas ilustraĵojn, t. e. iĝos adeptoj nekonscie.

*Ni do tre atentigas pri tiu teksto, kies regula enpresado estas novaĵo de **Tra la Mondo.***

ESPERANTO.

- Kio est'as Esper'ant'o ?
- Esper'ant'o est'as inter'naci'a help'a lingv'o, kiu cel'as facil'ig'o'n de hom'a'j inter'rilat'o'j.
- Kiu el'pens'is Esper'ant'o'n ?
- Student'o pol'a, nun doktor'o de medicin'o, nom'it'a Zamenhof.
- Ĉu la lingv'o hav'as mult'e da adept'o'j ?
- Jes, la lingv'o Esperant'o hav'as mult'e da adept'o'j, nom'it'a'j « Sam'ide'an'o'j ».
- Ili'a nombr'o kresk'as rapid'e; kaj ankaŭ la nombr'o de la grup'o'j form'at'aj konst'ant'e sur la tut'a ter'o. Oni pov'as vid'i tiu'n rapid'a'n progres'ad'o'n de la dis'volv'ig'o de Esperant'o, rigard'ant'e la lini'desegn'o'j'n sur la tri'a paĝ'o.
- Ĉu ekzist'as grup'o'j en ĉiu'j land'o'j ?
- Jes, kaj preciz'e sur la tri'a paĝ'o kaj sur la sekv'ant'a, oni pov'as legi raport'on tre interes'a'n pri tio, kaj vid'i divers'a'j'n dokument'o'j'n, kiu'j atest'as por tiu rimark'ind'a fakt'o.
- Ĉu, ver'e, en land'o'j tiel mal'simil'aj, oni parol'as la sam'a'n Esperant'o'n.

— O! jes. Ceter'e, se oni hav'us ia'n dub'on, oni ne pov'us ĝi'n konserv'i post la grand'a kaj grav'a kongres'o kiu okaz'os en Boulogne-sur-mer, en Franc'uj'o, de la tri'a ĝis la dek'tri'a de Aŭgusto 1905, sub la prezid'o de Doktor'o Zamenhof mem.

— Ti'o, ki'o'n vi dir'as al mi est'as ver'e mir'ig'a kaj mir'ind'a. Ĉu mi pov'us hav'i detal'o'j'n pri tiu kongres'o ?

— Cert'e, vi nur bezon'o's leg'i la sekv'ant'a'n numer'o'n de **Tra la Mondo**, kiu en'hav'os *plen'a'n raport'o'n* pri la kongres'o, same kiel ĝi sciigas en tiu ĉi numer'o pri la grav'a esperant'ist'a ekspozici'o, kiu okaz'is en Alĝer'o, tiu'n ĉi jaro'n.

— Ĉu tiu ĉi ekspozici'o sukces'is ?

— Jes. Ĝi est'is tre bon'e prepar'it'a sub la direkci'o de ni'a ĉef'redaktor'o, kiu, dank'al la fervoro de mult'a'j grupoj, kun kiu'j, de long'e, li amik'ig'is, kolekt'is dokument'o'j'n apart'e interes'a'j'n.

Ceter'e, mult'e da tiu'j dokument'o'j est'os el-montr'at'aj dum la fest'o'j de l' kongres'o de Boulogne.


TRA LA MONDO.

PROBLEMO 1^a. — Rebuso.

Rebusoj estas interesplenaj spritludoj kaj ni deziris enpresi el ili en Tra la Mondo. Multaj famaj « specialistoj » pri Amuzajoj skribis ke, Esperante, estas tute necble fari rebusojn, ĉar ne estas en la artefarita lingvo « homonimoj » (Same elparoleblaj vortoj).

Tra la Mondo ne konas maleblaĵojn kaj transpasis la malfacilaĵon: atente tegu la suban klarigon, kaj provu tiun amuzludon.

Serĉu signifon de ĉiu el subaj figuretoj; elektu, el la nomoj trovitaj, la konvenan silabon, kaj vi ricevos la sencon de l' rebuso.



AMUZAĴOJ.

NE VIN KALKULANTE.

— En tiu ĉi tempo, kiam oni vidas tiom da trouzoj, diris Petro al Johano, kiom, *ne vin kalkulante*, oni trovas da malfeliĉaj edzoj en via vilaĝo ?

— Kiel! *ne min kalkulante!*... kolerege, respondis Johano.

— Ne ekkoleriĝu, rediris Petro, mi ne intencis al vi malplaĉi. Nu! *kalkulante vin*, kiom da ili vi trovas ?

A. BAISSAC.

Oni toastas por la libereco kaj la progreso.

Riĉa bankiero diras :

— Mi, kvankam aristokrato kaj riĉegulo, mi estas granda amanto de la '93...

— Pro cento! ekdiras mallaŭte unu el la ĉeestantoj. 10072.

PROBLEMO 2^a.

El sekvantaj literoj eltrovi la sekvajojn.

HORIZONTALE.

Enspiri per nazo
Per forta voĉo
Kiu protektas
Vico, . limo, ... sekvo el skribitaj vortoj

a a a e f
i i i i l
l l m n o
r r ŝ t u

VERTIKALE.

Kapo de li, vosto de ĉiel
Persona pronomo
Alia pronomo akuzativigita
Okupiĝi
Kiu lumigas
Formo de l'pasiva participo
Prefikso
Infinitiva finiĝo.

A. BAISSAC.

Vidu anoncojn sur la 4^a paĝo.

L'Agado de « Tra la Mondo » povas resumiĝi per tiuj du vortoj

ALLOGI - KONSERVI

ALLOGI, per siaj figuroj, **sia eleganteco**, kiu al ĝi donos lokon en ĉiujn manojn, eĉ la plej delikatajn, en la plej luksajn salonojn, kiel en la plej seriozan lernoĉambron. Lerte uzata, ĝi donos facilan temon por preparoladoj por Esperanto, kies, en ĉiu numero, *universalecon* ĝi resumos, kaj ankaŭ *kapablecon por trakti ĉiujn temojn*.

KONSERVI, **ne estos la malplej grava parto de ĝia agado**. Ĉiuj propagandistoj, ĉiuj grupestroj, multe da profesoroj plendas pri la ŝanĝemeco de siaj rekrutoj, kiuj ofte perdas sian komencan fervoron, ne trovante sufiĉe da logaĵo en revuoj tute literaturaj malgraŭ ilia intereso. Ni penados konservi tiujn ekadeptojn. **Ĉar ni devas fari nenian perdon en nia batalado.**

Partoprenante en la persekuto de tiu grava celo, « Tra la Mondo » indas helpon de ĉiuj, kiuj vere *volas sukceson de Esperanto*.

Profitoj oferataj de « Tra la Mondo ».

« Tra la Mondo » volas ne sole utili propagandon, ĝenerale, sed ankoraŭ **volas helpi propagandistojn**, ofte haltigataj de **manko da mono**. Kiu varbos ses abonojn ricevos sepan **senpage**, t. e. valoron da 8 frankoj, kaj tiel *po ĉiu serio da ses abonoj*.

Plie **GRANDA KONKURSO** estas de nun malfermata. Tiu ajn, izolulo aŭ grupo, kiu varbos plej grandan nombron da abonoj ĝis la 31^a de decembro (almenaŭ 30) **ricevos 50 frankojn mone**. Kun-kalkulante la antaŭan profiton, estas do **PREMIO DA 90 FR.**, tre utilaj por la propagando.

Oni jam legis pri **aliaj konkursoj**.

Ni donos kondiĉojn de tiuj aliaj konkursoj en la venonta numero.

Abonkosto.

Malgraŭ ĉiuj tiuj profitoj, la Revuo kostas **NUR 8 frankojn**. Ni deziras, plie, rapide plidiki = kaj plibonigi la Revuon, kaj plimultigi la ilustraĵojn. Tio dependos de l'Esperantistoj

GRAVA AVIZO. — Ofte, pro manko da antaŭpripensoj, multaj personoj ne abonas tiuj novajn revuojn kaj poste estas devigataj **pagi altpreze** la unuajn numerojn. *Pri tio oni povas legi en ĉiuj Revuoj.* Atentiĝu pri tio :

UNUAJ NUMEROJ de « Tra la Mondo » alt-valoriĝos.

Rapidu aboni, aŭ almenaŭ mendu specimenon, kies **escepta kosto** estas **0 f 60 afrankite**, sendante *poŝtmarke* tiun sumeton al administracio.

ABONMENDILO (Modelo) ⁽¹⁾

Mi abonas « Tra la Mondo »

Nomo kaj baptonomoj.....

Profesio.....

Adreso.....

Sendita de(2).....

(1) *Skribi tre legeble kaj sendi tiun mendilon, en afrankita koverto, al « Administranto de Tra la Mondo, 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S et O), France ».*

Por eviti malsimplajn kalkulojn, ni plenumos nur mendojn akompanatajn de mono (vidu ĉi sube).

(2) *Se vi ne abonas propramove, ne forgesu tie ĉi aldoni nomon de persono, kiu abonigis vin. Tio estas tre grava, por ke ni povu enskribi la rajtojn de ĉiu je la senpaga abono aŭ je la premio de nia konkurso. Ni, efektive, nepre volas respekti tiujn rajtojn.*

Jara abonkosto : En ĉiuj landoj **8 fr. = 3 rubloj = 6 markoj 45 pf. = 1 dol. 52 cents = 3 hol. fl. 80 cents = 5 skand. kronoj 67 öre = 8 aŭstro-hungaraj kronoj.**

Unu numero, afrankita, 0 f. 75 centimoj.

Escepte por pago da specimenoj, oni akceptas poŝtmarkojn — *po 3/4 de ilia valoro* — nur el landoj ne havantaj internaciajn mandatojn.

REDAKCIO.

Avizo grava. — S^o Aŭgusto Montrosier reenirante Francujon, sendi provizore manuskriptojn al *Administrato*, sed adresitajn je l' *nomo* de l' Ĉefredaktoro.

Nepresitaj manuskriptoj ne estos resendataj.

Pro niaj altaj elspezoj, kiu ne volos nek aboni, nek pagi tiun numeron kiel supredirite, estas petegata bonvoli ĝin uzi por varbi almenaŭ unu abonanton, aŭ ĝin resendi al administratejo.

En raison de nos frais élevés, celui qui ne voudra ni s'abonner ni payer ce numéro comme il est dit ci-dessus, est instamment prié de s'efforcer de l'utiliser pour recruter au moins un abonné, ou de renvoyer le numéro à l'administration.

Administrato de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Avizo. *La unua elpensita amplekso estis 20 paĝa, laŭ formato de « Germana Esperantisto ». Pro la multaj artikoloj ricevitaj aŭ promesitaj, ni decidis pligrandigi la formaton — kio pli taŭgos por fotografaĵoj — iksante je 16 la nombron da paĝoj. Tiu plibonigo altigis la pezon super 50 gramojn ; konsekvence koston oni devis plikarigi pro la poŝtaj elspezoj.*

Anoncoj kaj reklamoj.

« Tra la mondo » iranta en ĉiujn landojn enpresos anoncojn ĉiulingvajn. Sed la komerca publikigo per Esperanto estas, nedube, la plej taŭga.

PROFITOJ DE LA ESPERANTA PUBLIKIGO — Ĝi prezentas grandegan profiton je la publikigo per naciaj lingvoj: kontraŭe je tio, kio ofte okazas pri tiu lasta, ĝi estas ĉiam legata, estanta legata ekzercu, kaj lernada (pri la teknikaj vortoj) por la adeptoj de la helpa lingvo.

Plie, ĝi donas eniron en ĉiujn landojn al komercistoj ĝin uzantaj.

Ni do tre atentigas la komercistojn pri la utilo de l'esperanta publikigo.

Prezo de nia publikigo.

Anoncoj	De 1 ĝis 3	1 fr.	ĉiulinie.
	3 ĝis 6	0 fr. 90 c	»
	6 ĝis 12	0 fr. 75 c	»
Paĝoj	1 paĝo	140 fr.	
	3 paĝoj ĉiujare	125 fr.	
	6 paĝoj almenaŭ, ĉiujare,	100 fr.	
Reklamoj.	— 3 fr. ĉiulinie, kun traduko.		

Linimezurilo 7 punkta, kolono da 6,5 centimetroj.

Avizo. — Por publikigo en lingvoj aliaj ol la franca kaj Esperanta, estas rekomendata sendi klišaĵojn, aŭ almenaŭ *presitajn* tekstojn La klišaĵoj estas devigataj por la lingvoj ne uzantaj, tipografie, la francajn presliterojn.

Se

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exibard » (Abisinia kuracilo **Eksibar**), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabako en la pipo. Tiu kuracilo, *ordonata de ĉiuj kuracistoj*, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare.

Sin turni al **Sinjoroj H. Ferré, Blottière et Cie**
102, Rue de Richelieu, Paris.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio = 1 f. afrankite ĉiu dedduo.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », 1 f. 50 ĉiu cento.

Ĉe « Tra la Mondo ».

JUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPÉE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
MAGUITE MOCROSIER



PARIS

ALPHONSE LEHERRE, ELDONISTO
37-39, PASSAGE CHOISEUL, 1871
R. BECVEL

Ĉarma verketo de l'fama
franca akademiano, kun
antaŭparolo tute aproba por
Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

La malgrandaj anoncoj de « Tra la Mondo ».

Tra la mondo organizas « anoncetojn » dank' al kiuj ĝiaj legantoj povos facile interkorespondadi. Tiuj anoncetoj enhavos du kategoriojn, t. e. :

1° La ANONCETOJ PRIVATAJ, pri **servproponoj, petoj por oficoj aŭ laboroj** (lecioj, kursoj, geservistoj, k. t. p...);

La proponoj por **interŝanĝoj** (poŝtkartoj, poŝtmarkoj, etajoj, sportoj, k. t. p...)

La luigoj da apartamentoj, domoj, k. t. p.

2° LA ANONCETOJ KOMERCAJ, rilatantaj ĝenerale la vendon de laboraĵoj, produktoj, aŭ specialaĵoj vendataj de komercistoj.

TARIFO.

Por *privataj anoncetoj*: 0 f. 15 ĉiu vorte por abonintoj kaj 0 f. 30 por neabonintoj.

Por *komercaj anoncoj*: 0 f. 50 ĉiu vorte, por ĉiuj delegantoj.

1. — S^{ro} Paul Henry deziras aĉeti Renault 4 1/2, aŭ 8-9 ĉ. Respondos nur al vera favorpropono. Sin turni 34, Rue Troyon, Sèvres, (France).

2. — S^o Vrtel Francisko, termezurista oficisto en Bruno, Elisabetpl. 4, Aŭstrio-Moravio, interŝanĝas belajn koloritajn poŝtkartojn. Afranku per malgrandaj poŝtsignoj.

Sendu mendojn kaj anoncojn *kun poŝtaj mandatoj* al « Administranto de *Tra la Mondo* », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, *antaŭ la 20^a de ĉiu monato*, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBI.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.